

V-19119/13

(1951)

vivo sen arto kaj religio estas kiel suno sen lumo kaj varmo. O. Deguči

# OOMOTO

MONATA ORGANO DE OOMOTO



13-a Jaro (N-ro 130)      Redakcio: Kameoka, Kioto-hu, Japanujo  
Abonprezo: ¥360 por enlando afrankite; \$1.5 aŭ ekvivalento da internaciaj respondkuponoj por eksterlando afrankite.

## Preparo por la Reveno de Metrejo\*

Onisabro Deguči

Antaŭparolo al 48-Vol. de la RAKONTOJ EL LA SPIRITA MONDO

La socia tendenco pli kaj pli inklinas al demokratio. Religio-kredo ne plu dependas sole de temploj kaj preĝejoj. Oni preferas satigi sian soifantan animon per tio, kion oni mem serĉas kaj trovas kongrua kun sia spirito. Nia estas la epoko, en kiu, kvankam oni ankoraŭ povas aŭdi la vortojn el la buŝo de pastro aŭ bonzo, tamen oni propre imagas kaj rezonas al si la revmondon de Dispirito, kaj konstruas en sia interno la templon de liberkredo. Malgraŭ la sanktaj skriboj de la malnovaj religioj, oni emas pli kaj pli legi nur literaturon, kian oni juĝas aŭ racia, aŭ poezia, kaj konscie aŭ senkonscie, serĉas por si en la mondo religion, kiu vere meritigas la nomon. La dekadencan guston de religiema gusto jen kompensas la nuntempa vasta populariĝo de artisma gusto.

Estas nerefuteble, ke la malnovaj religioj implicis politikaĵojn kaj neeviteble estis pli-malpli despotecaj. Male, la nova estas arta kaj demokrata, ĝuste por malfermi, laŭ la sankta promeso de Tempomaturiĝo, la vojon por la Reveno de Metrejo. Kaj ĝustatempe, ankaŭ miaj "Rakontoj el la Spirita Mondo" — dank' al la "peraj kaj senperaj" manieroj de Dio — estas pretaj en la formo plej demokrata kaj arta, tiel ke la profundaj instruoj por la eterna vivo estos transdonitaj al ĉiuj homoj de l' hodiaŭo kaj al la estontaj generacioj. (Skribita: 12 jan. 1924.)

\* Budaisma termino uzata por facila komprenigo: kio estas la Reveno de Kristo en Kristanismo, tio estas la Reveno de Metrejo en Budaismo. La Redakcio.

Jen la speciala numero pri Arto kaj Religio. Ni esperas, ke niaj legantoj aprecos la artajn flankojn de Oomoto kun tia ĝuo, kian ni havis dum la tuta redaktado, kaj kiuj ĝis nun ankoraŭ ne estis artismemaj, facile malfermos al si la pordon de arto. La Redakcio.



## LA IZUNOME KANNON\*


Rajdanta sur Fenikso

Desegnita de O. Deguči

Hosano:


頌歌  
永遠の國の高きへ  
君は天がけりゆき給ふ  
譬ふるものなき君よ  
恵み深き君よ  
切なる願ひを聞き入れ給へ。  
ゲイテ「ファウスト」  
森鷗外訳

Tiu ĉi hosano estas el la versoj (12032-36) en FAUST de Goethe, kies esp-an tradukon nia redakcio ne posedas. Por ne kaŭzi venĝon al eŭropanoj (vidu p. 63), ni simple ne entreprenis esp-igi ĝin el la germana originalo kaj anstataŭigis ĝin per la japana traduko.



← Eniru la ĉambron por vidi, en kia larĝeco la supre-montrita Kannon estas desegnita. La aliaj "kakemonoj" (rulpendaĵoj) de maldekstre: 2a, la Kannon sidanta sur roko; 3a, la Mil-Mana Kannon (por savado); 4a, la Miroku-Trio (Vidu p. 18.21 de l' antaŭlasta n-ro); 5a, la Kannon rajdanta sur drako; 6a kaj 7a, la Kannon; la plej dekstra, Darmo.

Antaŭ la kakemonoj staras ekrane kelkaj disfaldeblaj albumoj, kiuj elmontras 1) oblongajn "tanzakojn," kaj 2) kvadratajn "ŝikisiojn," sur kiuj O. Deguči desegnis aŭ skribis siajn poemetojn.



← En la alia ĉambro ni montras al vi la "husumaon" (glit-paperpordo, ne lum-trairebla) sur kiu O. Deguči desegnis pejzaĝon kun granda arbo. Ĉe l' ambaŭ ekstremoj de la ĉambro vi vidas "ŝojiojn" (paperfenestraj pordoj, diafanaj, sed netravideblaj). Sur la planko, vi vidas naŭ "tatamojn" (pajlomatoj), kies unu-opa formato estas 1 × 2 m.

\* Izunome: Absoluta amo  
Kannon: Diino de Humano (Avalokitesvaro)

# Arto kaj Religio

Onisabro Deguči

## Pri la eldono de La Rakontoj el la Spirita Mondo

Arto kaj Religio estas paro nedisigebla — kvazaŭ geedzoj aŭ gefratoj. Ambaŭ estas la Gvidanto de la vivo. Sur la solida fundamento de la profunda koro, ili satigas la animsoifon kaj transigas la homon en la varman sinon de Dio. Ambaŭ estas la Piloto kiu kondukas nin el inter inferecaj vivagonioj al la ĝuo de la ĉielregna vivo. Laŭ la gvido de Arto ĉe unu mano, kaj de Religio ĉe la alia, ni faru la viv-vojaĝon en ĝuo kaj feliĉo. Vere, ke ni povas fari la vojaĝon de vivo — tiel plena de kontraŭecoj kaj ĉagrenoj — kvazaŭ tra la pompa ĝardeno kie ĉarme kantas birdetoj kaj ridas belaj floroj, tio estas ja dank' al la akompanantaj du belaj Gefratoj — Arto kaj Religio. Nesupozeble estus, kia malgajo kaj sengusto plenigus la homan mondon, se akompanus nin neniu el la Gefratoj! La Gefratoj — al ili ni dankas la neelĉerpeblan guston de la vivo, pro kiu ni sentas nin nedisigeblaj de la homa mondo.

Arto kaj Religio estas similaj en tio, ke unu estas la Gvidanto de nia vivo kiel la alia, sed malsimilaj en tio, ke la unua nin kondukas al la ĉielo tra la pordo de belo, dum la alia tra tiu de vero kaj bono. Arto reprezentas al ni la pitoreskon de la ĉielo pere de naturbelajoj laŭ formo, koloro, sono kaj parfumo; kaj Religio lasas nin kontakti senpere kun la vivo de Dio dank' al mistika interkomunikiĝo interna. Tial Religio ne bezonas materiajn perantojn. Ĝi rekte celas, ke ni, per la tiel-nomataj Di-saĝo, spirita kapablo, telepatio aŭ "transiĝo," agnosku la veran staton de la Spirita Mondo — ne videbla per okuloj, nek aŭdebla per oreloj, nek sentebla per koro.

La objekto de Arto estas belo. Kaj belo finfine estas la ekstera trajto de Dio kaj ne Lia interno; Lia survesto sed ne Lia enhavo. Eterne veraj estas la vortoj de Jesuo: Dio estas spirito; kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero.



“Fukurokuju” — unu el la “Sep Feliĉdijoj” — desegnita de O. Deguĉi  
La longega kapo simbolas superajn aĝon kaj saĝon kaj riĉon.

Arto, kun belo kiel la objekto, kapablas montri al ni la figuron de Dio, sed ne enkondukas nin en la mistikan ekstazon, en kiu stato ni komuniĝas senpere kun Dia koro kaj spirito, por ke ni estu, agu, kaj vivu kun Li. Per Arto ni nur povas tuŝi, por tiel diri, la baskon de Dia vestaĵo, sed neniel ekkuŝi en la varma sino de Dio, nek senti la pulsadon de Lia vivo. La objekto de Arto kulminas en la ekstazo, en kies stato ni lasas nin distri kaj ravi de natura belaĵo en la momento kiam ni forgesas la kateĵojn de la fizika mondo. Tial la ĝuo, kiun donas Arto, estas nur efemera, ne eterne daŭra. La distriĝo per Arto, do, estas limita al la mondo de imago super la reala mondo de vigla aktiveco. Ĝi apartenas al la dolĉa fantazia mondo, en kiu ni flanken lasas tutan laboron kaj ŝvitadon, kaj momente restas ravita kaj eĉ ebria. Tia estas estetika vivo.

Multe pli supera kaj majesta ol tia estas la ekstazo, kiun promesas doni al ni Religio. Kion ni celas en religia vivo, tio ne estas naturbelaĵoj, sed spirita belaĵo. La objekto de religia vivo estas belo, ne laŭforma, ne ekstera, sed interna kaj karaktera.

En religia vivo ni celas spiritan altiĝon kaj disvolviĝon, por ke ni eterne vivu kaj agu kun Dio manifestante en ni mem la veron kaj bonon, kiuj estas en Lia interno. Tia estas religia vivo.

La ĝuo, kiu venas de religia vivo, ne estas supraĵa, kia okazas ĉe artisto, kiu momente forgesas la ĝenojn de la vivo dum li okupiĝas en aprecado aŭ kreado de belartaĵo. Religiisto en ĉiu momento, tage kaj nokte, strebas al spirita evoluo por ke li elfaru per sia tuta animo perfektan karakteron puran kaj noblan — en si, ekstere purigante la mondon kie li vivas.

Lia ĝuo kuŝas ne nur en vido al la figuro de Dio, sed ĉefe en la konstanta celado al la plej-Alto, por ke li fariĝu plena enkorpiĝo de

真善美宅


王仁書

Tiu ĉi faksimilo montras la “kursivan” kaligrafion de O. Deguĉi

La presita formo:

真 = Vero  
善 = Bono  
美 = Belo  
愛 = Amo





← La Rakontoj el la Spirita Mondo konsistas el 81 volumoj (ĉiu vol. enhavas ĉ. 400 paĝojn en formato: 13 × 18.5 cm.) Unu el la ĉefaj karakterizoj de Oomoto kiel religio estas, ke la fondintino Nao Deguĉi kaj la kunfondinto Onisabro Deguĉi mem verkis, aŭ diktis sanktajn revelaciojn. La Sankta Skribo de la Fondintino kaj la Rakontoj el la Spirita Mondo de O. Deguĉi konsistigas la "Oomoto-Biblion."

La maldekstra foto elmontras nur parton de la verkaro de O. Deguĉi: la Rakontojn el la Spirita Mondo, kaj aliajn.

sankta belo kaj bono. Por li senanimaj kanvaso kaj marmoro ne estas bezonataj por superlabori. Kaj tamen li estas la granda artisto, ĉar el sia propra animeco li skulptas la sanktfiguron de Dio en si mem. Lia ĝuo konsistas en la eterna aktiveco por alproksimiĝi, sekundon post sekundo, paŝon post paŝo, al la gloro de Dio. Tial lia ĝuo estas konstanta kiel lia vivo estas eterna. Kaj ĝi venas de la Vera Mondo de Dio kaj ne el la mondo de fantazioj. La samon diras Jesuo: Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuragiĝu.

Por realigi la idealon de belo, ni bezonas unue serĉi ĝian fonton kaj eltrovi ĝian originan Liveranton. Kun li ni devas vivi: zlie, nia idealo ne estos realigebla, ĉar la nia ne estas la realigo de belo laŭforma kiel en la okazo de hodiaŭa "artista," sed ja interna: ni devas realigi ĝin sur nia propra karaktero kaj en nia vivo.

Arto en la vera senco de la vorto havas eternan vivon, viglon kaj senliman fonton de ĝuo. Iam mi asertis, ke Arto estas la patrino de religio. Sed tie ĉi, la vorto Arto ne estas identa kun "arto" en la komuna uzo nuntempa. Laŭ mi la tuta universo kaj ĉio en ĝi, kio estas kreita, estas la gigantaj kaj majestaj artverkoj de Dio. Dio estas la Artisto. Kun Li, kaj kun Lia interno ni devas unuiĝi. Kun Li ni devas ĝui, vivi kaj agi. Kaj tion ebligas la vera Religio. Kaj por plene unuiĝi Arton kaj Religion mi ja diktis "La Rakontojn el la Spirita Mondo," kaj tion mi faris el mia arda deziro, ke la tuta homaro ĝuu la eternan vivon de la ĉielregno. Kaj kun mia konvinkigo, ke Arto kaj Religio estas destinitaj unuiĝi, mi jen eldonigis la Rakontojn. (Tradukis T. Nakamura)

Venis por kio  
mi Esperanto-Dio?  
Por ja nenio  
alia ol la fondo  
de paca, verda mondo!  
O. Deguĉi  
Trad. E. Itoo

"Subpresita" sur ĉi paĝo estas la "Esperanto-Dio" desegnita de O. Deguĉi. Sur la pinto de l' bastono, kiun Li portas, estas la verda stelo.

#### BIOGRAFIA SKIZETO

### Onisabro Deguĉi (1871-1948)

\* Naskiĝis 12 julio, 1871, en vilaĝo Anao, proksima de Kameoka, Kioto-gubernio, kiel la sep-generacia pranepo de l' famkonata Marujama-Ookjo, la iniciatinto de l' Marujama skolo de l' japana pentroarto. Marujama-Ookjo estas la nomo de Mondo Ueda kiel pentroartisto. Onisabro en junaĝo nomiĝis Kisabro Ueda.

\* En 1898, plenumis unu-semajnan asketismon ĉe l' vilaĝa monto Takakuma, kie li travidis la mistikajn interrilatojn de l' mondoj fizika, infera kaj ĉiela.

\* En 1900, fariĝis Onisabro Deguĉi, kiel la adoptita filo de Nao Deguĉi (vidu p. 59), la fondintino de Oomoto.

\* En 1921, okazis la unua persekuto al Oomoto-movado (la tiel nomata Oomoto.Afero Ia.) Li estis en malliberejo 126 tagojn.

\* En la sama jaro, post reliberiĝo komencis dikti la "Rakontojn el la Spirita Mondo" el siaj iamaj travivaĵoj ĉe monto Takakuma.

\* En 1923, adoptis Esperanton kiel la oficialan lingvon de la Oomoto-movado por eksterlando.

\* En 1925, fondis la Universalan Homaman Asocion en Kameoka.

\* En 1926, komencis produkti tertasojn. De 1926 ĝis 1935 estas la unua periodo de lia tas-kreado, kaj la nombro de l' tertasoj faritaj dum tiu tempo atingas ĉ. 5,000.

\* En 1931, aliĝis kiel aktiva membro al ĉ. okdek poetaj asocioj, kaj regule kontribuis per kelkaj poemoj al iliaj monataj gazetoj. La nombro de l' poemoj, kiujn li verkis dum la tuta vivo, atingas ĉ. 600,000 el kiuj "Ĉentraj Poemaro" aperis en dek dikaj volumoj.

\* En 1935, okazis la dua persekuto al Oomoto-movado (la tiel nomata Oomoto.Afero IIa.) Li arestiĝis.

\* En 1942, reliberiĝis.

\* De la sama jaro, ree okupiĝis en artoj de kaligrafio, pentrado, poemfarado ktp.

\* En 1944, rekomencis man-fari tertasojn (la dua periodo).

\* En 1946, refondis Oomoton sub la nova nomo de "Aizen-en." (Nun la nomo estas Oomoto.Aizen-en.)

\* 19 jan. 1948 ĉieliris. La nombro de l' tertasoj faritaj dum la mallonga dua periodo kalkuliĝas je ĉ. 3,000.



#### PLEJ HONORINDA

#### SINJORO O. DEGUĈI


La tempo plektis en la grizajn harojn  
Radiokronon, kiu brilas ore  
Kaj via amo floras multajn jarojn,  
Homaro dankas al vi ĉiuhore.  
Benata estu ĉiam via nomo,  
Ho, grandanima sankta Dihomo.

SOPHIE ĈIPERA,  
Ĉeĥoslovakujo

DEGUĈI Onisabro, japano, ĉefo de Oomoto-ismo, prez. de Universala Homama Asocio. Nask. 12 jul. 1871 en vilaĝo Asao\*, Kioto.hu. Eklernis En en 1923, kaj samtempe kondukis ĝin en O-ismo, kiel la ĉefan lingvon por eksterlanda propagando de O. 1924 fondis E Propagandan Asocion en Kameoka. Verkis: Poemeta ro (por facila memoro de E-aj vortoj), 1924.

Reprezenta el ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO  
Ia Vol. paĝo 104

\* Korektu: Anao (La Red. de OOMOTO)



## Tetasoj de O. Deguĉi

Torao Deguĉi


Ĝenerale, kiuj neniam vidis mian patron dum li vivis, ofte imagas al si, ke li estis homo eksterordinara, — homo kun io ne-taksebla laŭ kutimaj mezuriloj, — aŭ simple prenas lin por ia mistikulo. Sed por ni, kiuj vivis apud li, li estis bona patro, kaj por niaj infanoj bona avo. Li amis homojn. Li amis florojn. Li amis montojn kaj kampojn. Li estis la filo de la Naturo.

Preskaŭ sep jarojn li estis en karceroj. Li fariĝis libera en 1942. Nun libera granda Infano li estis — jam kun la aĝo de pli ol sepdek jaroj. Li baldaŭ absorbiĝis en la kreado de tetasoj. En li ni trovis infanon, kiu forgesas sin en la ludado per tero. La tertasoj, kiujn li elknedis, estis tiel riĉaj je formo kaj forto; la pentritaj makuloj sur ili kreskis pli kaj pli en gloro. Ĉiu forno alportis al ni mirindajn verkojn laŭ formo kaj koloro. Kaj ni suspektis de kie venas tia freŝa senso. Ni admiris ke io venas de li, kio estas super Bonnard kaj Matisse. Al ĉiuj siaj tasoj li donis nomojn kaj inter la plej favorataj estis “Ĉielregno” kaj “Edeno.” Vere, liaj kreskaĵoj estas kvazaŭ la brilantaj floroj de Edeno. Ĉiun tason li faris kun enspiro de sia preĝo kaj aspiro. Li ofte rakontis al ni, ke la tekulto estas la ludo de anĝeloj.

Malpli ol du jaroj antaŭ lia forpaso en 1948 estis la periodo en kiu li enverŝis la energion de sia tuta vivo al tas-kreado, kaj postlasis ne malpli ol 3,000 tasojn. Unu el ili hazarde altiris la atenton de la nuntempa artkriticisto s-ro Giĉiro Kato. Al li ni ŝuldas la populariĝon de la nomo de O. Deguĉi kiel artisto.

Supre-montrita: Kolorriĉa tetaso de O. Deguĉi; verko en la dua periodo de lia tas-kreado.

Dekstra: Elverŝaĵujo (kun la kesto), verko en la unua periodo.



"Beauty is truth, truth beauty—that is all  
Ye know on earth, and all ye need to know." John Keats

## Onisaburo Deguchi's Tea Bowls

A child of nature, Onisaburo Deguchi could not help expressing himself in one form of art or another. Late in 1944 he found a medium of clay for his art work and began to occupy himself by making colorful tea bowls. He spoke of the tea ceremony as a pastime of celestial angels. He loved tea bowls and the art of bowl-making. In modelling and painting, and seeing the response of glazes and clays to heat, he found immense pleasure. Perhaps his greatest gift is the exuberance of color, for his felicity of brush and rare sense of beauty made him a great genius. Within the short period of one and a half years he produced about 3,000 colorful tea bowls. They are artistic in the highest sense, abounding in imagery and charm and redolence of celestial perfume. However, they did not gain early recognition. The tea ceremony bowls made to the present date were all sober in color and design, or with no design at all, while his bowls are bright in an endless variety of glowing tones and resplendent colors. The power of his joyous, valiant and optimistic personality runs through each one of them. The people, as bound by tradition could not appreciate his freedom in art. It was only after his ascension that Mr. Giichiro Kato, his contemporary critic of Oriental ceramics, appreciated the true value of the Deguchi's works as "epoch-making masterpieces," and gave full recognition to these. Mr. Kato's lengthy introduction and high appraisal of these bowls appeared in the August and December 1949 issues of NIPPON BIJUTSU KOGEI (The Japan's Art and Craft), published in Osaka. During this same year the bowls were exhibited in Tokyo, Osaka, Kyoto, and Kanazawa.

A versatile artist, Master Onisaburo Deguchi, during his lifetime produced a variety of magnificent works in literature, poetry, painting, calligraphy, architecture, and other arts and crafts. His lifelong objective in the arts was to project the Kingdom of Heaven upon the earth. He put his heart and soul into his works bearing witness by acts of truth and goodness in his own life. With the gift of inspiring others to look toward heaven, his works made religion a vital force to not only his present day followers but future generations as well.

PHOTOS of the pictures and writings by O. Deguchi. Page 50. (Top) Izunome-Kannon flying on the phoenix; (Middle) The same is shown with other kakemonos; (Bottom) Landscape on the sliding-doors. Page 52. The God of Longevity, one of the Seven Deities of Good Fortune. Page 53. Calligraphy in the cursive style of Chinese characters which read: 眞 (Truth), 善 (Good) 美 (Beauty), 愛 (Love). Page 54. Onisaburo's "The Stories from the Spiritual World" (81 Volumes) and other works. Page 56. Onisaburo's hand-made tea bowls. Inserted: the technicolor pictures of the bowls. Page 60. (Top) Mrs. Sumiko Deguchi, Onisaburo's widow, reeling; (Middle) Her hand-woven neckties and other products; (Bottom) Her drawing. Page 61. Sumiko's "Dharma" drawn with one stroke of the brush.

## Something Different For 'Tea Ceremony'

Drinking bowls used in tea ceremony which had been unrecognized and unknown until after the death of its maker, have recently come to light and are causing no little sensation in tea ceremony circles.

The tea bowls in question were made by Wanisaburo Deguchi, second in line of the Omoto sect, the present Aizen-En (Garden of Love), who made some 1,500 since his release from prison immediately following the war after serving seven years on a charge of lese majeste, and which he continued up to his death two years later.

Aside from the question of the excellent craftsmanship of the bowls, which the lesser "die-hard" and less conservative experts and critics of tea ceremony declare compare with the best, they are "revolutionary" in color schemes.

Whereas tea ceremony bowls made to the present date were somber in color and design, or to be more accurate, no design at all, the present bowls are a riot of bright colors and unorthodox designs.

That they will be recognized by the various schools of tea ceremony is doubtful but the fact that they are attracting wide interest, there is no doubt.

Some 100 of Wanisaburo Deguchi's best works are now on exhibition at the Hankyu Department Store, Osaka, open to the public until August 28.

Clipped from  
THE ENGLISH MAINICHI  
Dated Aug. 25, 1949





La vero estas por eterne unu-sama, sed la instruoj ŝanĝiĝas depende de l' fondintoj kaj la cirkonstancoj: Jeko kaj epoko kaj kultur-nivelo. O. Deguĉi

## Arto estas Nia Ĉiutaga Vivo

Estas tri malsamaj pordoj, tra kiuj oni povas atingi Dion:

1. La pordo de bono kaj amo (religio, aŭ etiko)
2. La pordo de vero kaj logiko (scienco, aŭ filozofio)
3. La pordo de belo (arto)

Kiuj apartenas al la unua kategorio estas malfacile troveblaj, ĉar nur tiuj povas trairi, kiuj denaske havas altruisman kaj noblan koron. Nur eksterordinare kulturita persono sukcesas tra iri tiun ĉi pordon. Do, ĝi estas malfacila pordo.

Ankaŭ la duan pordon ne ĉiuj kapablas trairi. Per logiko kelkaj atingus Dion, sed aliaj plej multaj ne. Tiu ĉi ankaŭ estas malfacila pordo.

Tamen, la trian pordon ĉiuj povas facile eniri kaj tra iri — la pordon de belo. Ĉar percepto pri belo estas komuna al ĉiuj homoj. Neniu sentas abomenon kontraŭ bela floro. Ĉiu povas senti la belecon, egale ĉu saĝulo aŭ malsaĝulo, ĉu riĉulo aŭ malriĉulo, ĉu junulo aŭ maljunulo.

Parolante pri arto, se iu konsiderus, ke nur tiu povas gustumi kaj ĝui arton, kiu havas tempon kaj monon je sia dispono, li eraregas. La naturo ĉirkaŭ ni donas al ni grandajn artajn verkojn. Nia ĉiutago estas en la ekspoziciejo de arto — arto de Dio, kiu estas granda Artisto. Arto povas esti teksita en nia okupata ĉiutago, kaj oni povas ĝui ĝin kiam ajn. Vi ne nepre bezonas elekti malfacilan arton, kiu postulas al vi specialan teknikon. Vi ne nepre bezonas okupiĝi en arto, kiu formangas de vi multan tempon kaj monon. Arto estas facile trovebla kaj ĝuebla en via ĉiutago. Zorgu, kiel vi povos pli bele kaj harmonie aranĝi la meblojn en via domo, kaj tio estas arto. Rigardu eksteren por ĝui aŭ admiri la naturan pitoreskon, kaj tio estas arto. Gustumu la subtilecon de l' homaj koroj

en via ĉiutaga kontaktiĝo Lun viaj kunhomoj, kaj tio estas arto. Arto estu nia ĉiutaga vivo.

## Estu Poetoj!

"Estu poetoj! Inter poetoj troviĝas neniu malbonulo. Miaj apostoloj, vi ĉiuj lernu la versfaradon de tanka-poemetoj. Pretekstu neniam: "Ĉar mi estas tro okupata..." aŭ "Se mi estus iom pli lerta..." Tiuj vortetoj "Ĉar" kaj "se" estu en ĉiu okazo al vi tabuo. Memoru ĉiam, ke al via fervoro respondos Dia favoro. Sen Dia favoro, neniu el vi povos labori, aŭ esti taŭga, por la Sankta Afero."

Fidelaĵ al tiu ĉi admono de O. Deguĉi, preskaŭ ĉiuj Oomotoanoj ĝuas versfaradon kaj estas pli-malpli bonaj poetoj. Siajn versaĵojn ili kontribuas al la "KONOHANA" (72-paĝa monata art-revuo en formato 15x21.5cm), eldonata de la art-asocio de Oomoto, nomata RAKUTENŜA kies iniciatinto estas O. DEGUĈI mem, kaj kies nuna gvidanto Torao, unu el liaj hofiloj. La kelkmil publikigitajn poemetojn ĉiumonate revizias kaj selektas Naohi, poetino kaj la unua filino de O. Deguĉi. Kaj la poezio ne estas la sola tasko de RAKUTENŜA. Ankorau estas aliaj artismaj fakoj...

Karaj legantoj! Vi facile vidas, ke Oomoto estas ne nur religio, sed ĝi estas ankaŭ artista movado celanta la reformon al la mondo per artisma krea povo sub Dia inspiro.

## Real Enjoyment

All real and whole. some enjoyments possible to man have been just as possible to him, since first he was made of the earth, as they are now; and they are possible to him chiefly in peace. To watch the corn grow, and the blossoms set; to

draw hard breath over plough-share or spade; to read, to think, to love, to hope, to pray — these are the things that make men happy.... Now and then a wearied king, or a tormented slave, found out where the true kingdoms of the world were, and possessed himself, in a furrow or two of garden ground, of a truly infinite dominion.

—JOHN RUSKIN—  
"Modern Painters." Part IV,  
chap. xvii, 357

### Ĉefinstruo

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestiĝas senlimaj forto kaj aŭtoritateco.

### Maksimoj

1. Observu la veran aspekton de la Universo por rekonii ke ĝi respegulas la Korpon de Vera Dio.
2. Konsideru la seneraran funkcion de la Universo por agnoski la Forton de Vera Dio.
3. Konsideru la koron de la Vivantaj por percepti la ekziston de l' Animo de Vera Dio.

### Devizoj

1. Harmonio (inter Dio kaj homoj (ar)o; inter regnoj ĉiela kaj tera ktp.)
2. Instruo (pri Dia Vero)
3. Naturo (de ĉio viva kaj senviva)
4. Produktemo (bazita sur sankta karaktero de la misio)

### Principoj

1. Purismo (de animo kaj korpo)
2. Unuecismo (inter klasoj de la socio ktp.)
3. Optimismo (pro la aranĝo de Dio)
4. Antaŭenismo



Fondintino Nao Deguĉi

(1856-1918)

Same kiel prunfloroj en plena florado Nun ekfloros la glora epoko de l' Mondo Unu fojon por ĉiam sub mia regado; Mi, Pradio, revenis por Mia regnfondo.

EL LA SANKTA SKRIBO

En 1892 Nao "ekkriis" kaj poste skribadis Diajn vortojn, anoncante la alvenon de Dia Regno. En la daŭro de 27 jaroj ŝi skribadis 200.000 paperfoliojn da Diaj vortoj. Ilin ni hodiaŭ konservas en la formo de la Sankta Skribo de la Fondintino, el kiu la suprecititaj estas ja la unuaj vortoj.

Ŝi profetis ankaŭ la revenon de Mesio kaj devis atendi sep jarojn antaŭ ol ŝi renkontis lin en la destinita persono de Onisabro Deguĉi. Por komparo, Nao rilatas al Onisabro, kiel Johano, la Baptisto, al Jesuo.

La sankta animo de la Fondintino forlasis la teron kaj flugis al Dio ĝuste en la sama tago, en kiu la Mondmilto I venis al la fino — la 6-an de Novembro 1918.

### AJABE

Ajabe estas "mecca" de Oomoto. En la gubernio de Kioto, ĝi kuŝas 77.8 kilometrojn nordokcidente de la japana antikva ĉefurbo Kioto. Malgranda ĝi estis kiam la Oomoto-movado naskiĝis antaŭ 59 jaroj. Sed la du faktoroj prosperiĝis ĝin: Oomoto kaj silkindustrio. La 1-an de aŭg. de la lasta jaro (1950) oni inaŭguris la "urbon" de Ajabe kun la loĝantaro de 33,573. En la dua plena kunsido de l' urb. deputitaro, la 14-an de okt. 1950 oni unuanime pasigis la rezolucion por fari la urbon de Ajabe

"Mondfederacia Urbo." Kiel provinca aŭtonomio en nia lando, Ajabe estas la unua por proklami sin "Mondurbo." Vere ĉarma urbo, ĝi meritas la nomon.

Nu, en Ajabe, kie kuŝas la Oomoto-teritorio, ĉiu vizitanto devas antaŭ ĉio supreniri la monteton Curujama, kiun Oomotoanoj alinomas Oliv-arba Monto. Ankaŭ fremdlandaj vizitantoj unuanime diras, ke ĝi vere similas al la samnoma montoen Jerusalemo.

Sur ĝia supro foje staris Sankta Templo kun majesta aspekto. Ĝin tamen dishakis la tirana ordono de la registaro japana en 1921, sur simpla preteksto, ke la formoj de la domo ofendis la regulojn pri konstruado dekretitajn en 1872. Vere la Templo estis dispremita sub la piedoj de oficistoj kaj ĝi jam ne ekzistas plu sur la monteto, sed tamen antaŭ animaj okuloj ĉiam aperadas glora konstruaĵo en vizio, kaj en oreloj sonadas iu mistera pia voĉo.

En Curujama, sur kiu staris iam sankte' la fama, korŝira nun la kukol' tag-nokte krias en sol'!

Tiel prikantis O. Deguĉi. Ĉe la supro de la monteto li starigis ŝton-monumenton engravuritan per tiu ĉi poemeto. Sed ĝin ankaŭ oni disrompis en 1935. Samtempe disfalis tera altaro kaj la tuta domaro, sed neniam estingiĝis la fajro en nia animo, kiun ni konservadis dum la longa martira periodo, ĉar en la unuaj vortoj de Sankta Skribo (supre-montritaj) ni aŭdas voĉon de "krianto" — la kukolon kiel feliĉan heroldanton de Printempa Tajdo por la homaro.

### KAMEOKA

Kameoka kuŝas 21.8 kilometrojn en la nord-okcidento de Kioto. La dekŝes-jarcenta kastelurbo ĝi estas.

En ĉiela nub' kiam sidis kastel.tur' mi nur estis bub'; kiom loĝis min blankmur' sunbrilanta en lazur'!

La kastelo, prispirata en tiu ĉi poemeto de O. Deguĉi, jam ne plu sidas, sed sidas hodiaŭ sur la sama teritorio la Centra Oficejo de Oomoto kaj Universala Homama Asocio. Dum Ajabe estas la centro rita, Kameoka estas propaganda. Tie ĉi aperas tri "monataj" kaj du "duon-monataj" periodaĵoj de nia movado.

La vinjeto montras branĉeton da prunfloroj.

Fadenojn en tord' →  
mi zorge nun malplektas  
por meti en ord':  
brokajon de l' mondpaço  
el ili plu mi teksas.

## Teksado kaj Mi

Sumiko Deguči\*

Manteksado estas mia plej amata okupo. Antaŭe mi teksis ŝtofojn interligante fadenojn jam uzitajn, sed nun mi uzas ankaŭ novajn. En la lasta tempo mi sukcesis tinkturi fadenojn per pigmento, kiun mi ekstraktas el herboj kaj arbo-trunkaj ŝeloj. La produktaĵoj estas mirinde belaj.

Mia industria laboro instruas al mi multon pri la mondo kaj la sankta afero. Kiam mi laboras super bobeno, fadenoj ofte implikiĝas, kaj por ordigi ilin necesas granda pacienco, sen kiu ili pli kaj pli komplikiĝas ĝis ilia neuzebleco. Sed eĉ fadenoj en malordo fariĝas uzeblaj por teksado, se mi donas al ili nur ordon kun granda pacienco.

Kiam mi laboras super teksilo, por ĉiam necesas teni harmonion inter vefto kaj varpo. Same ankaŭ pri la monda afero. Nenia "teksado" estas ebla sen harmonio. Ĝuste en la Sankta Skribo de Nao, mia patrino, Dio komparas Sanktan Aferon al TEKSADO. Sen harmonio inter la homaro, la "mondteksado" ne estas ebla. La tuta homaro, ĉu almozuloj, ministroj, komunistoj... egale estas la gefiloj amataj de Dio. Do, harmonio devas regi inter ili, se ili deziras "teksti" mondpacon.

Mia manlaboro estas modesta, sed mia ĉeftasko, destinita de Dio, estas plenumi la "modelon" laŭ kiu nur poste la Monda Brokato teksigōs.

Ho, estu Paco

Ho, estu Paco  
nun konstruita brile  
jam kun aŭdaco  
sur bazo senperforta;  
alie, ne stabile!

\* La nuna ĉefo de Oomoto-movado; filino de la Fondintino kaj vidvino post Onisabro Deguči.



S-ino Sumiko Deguči



"Produktemo" estas unu el la Principoj de Oomoto (vidu p. 58). La foto montras la manteksadojn de S-ino S. Deguči. En la mezo estas kravatoj, kaj amasigitaj ambaŭflanke estas ŝtotoj por kimono kaj sono.

Min Dio, dankon al li, faris tia, →  
ke min ne trafas via stat' misera  
nek tuŝi povas fajno incendia.  
Dante: INFERO, II, 91-93  
Trad. de Kalocsay

## Poemoj de S. Deguči

Tre vasta  
estas mia koro

For de la mondo malfacila,  
Mi vivas en karcer' trankvila:  
Eĉ se leviĝo, kuŝ', movado  
Ne estas tute laŭ la volo,  
Tre vasta estas mia koro.

Darmo, desegnita  
de Sumiko Deguči  
per unu-spira  
strekado de  
peniko en  
Q-formo.

Hodiaŭ ankaŭ tutan tagon  
Pasigis mi legante l' agon  
De Reukan kun intereso;  
Kun li mi jen interparolis,  
Paserojn ankaŭ mi petolis.

Eĉ l' oleo mankis  
por altar-ofero

Mi floran lasis kaj reprenis,  
Kaj en akvujo nun entenis;  
Respegulitan en la akvo,  
Mi ĝin rigardas des pli bela,  
Kunulo mia, ho, fidela!

Pri la hejm' en knabinec' la karmemoro:  
De mateno frua ĝis vesper' malfrua  
Panjo estas for pro viv' al taglaboro,  
Kun fratino restas mi en dom' enua.

Nu, venos morgaŭ la filino:  
Dezirojn havas mi sen fino,  
Por aŭdi ŝin kaj diri al ŝi;  
Paperpecetojn al la floro,  
Kunligu mi pro la memoro.

Tago flugas dum ni ludas nur ekstere,  
Sed vizitas nin malĝaj' kaj jam ni preta  
Iras panjon vidi sur la voj' vespere  
Laŭ la rivereto, sur la vojo eta.

Por atendi — sen forges'  
Unu, du, tri, kvar, kvin, ses...

"Venu, ho lampiroj!" voke ni invitas,  
Kelkaj ĉe la bord' ripozas, kaj per maŝoj  
Ni por kapti ilin absorbite ŝvitas,  
Ni subite aŭdas treton jen de l' paŝoj.

La Edena rond'

La Edena rond'  
ekaperus tuj sen dub'  
tra ĉi tiu mond',  
se l' tut-povon por milit'  
vi nur uzus por karit'!

"Ho, la panjo!" vide ŝin ni kriis salte,  
Ŝi rideton sur vizaĝo nin renkonte  
Tiras manojn niajn per la siaj alte  
Kaj kondukas nin al hejmo reironte.


En la domo regas nokta jam mallumo,  
Klak, klak, klak... siliko tintas kontraŭ fero,  
Por prilumi l' ĉambron per malforta lumo;  
Eĉ l' oleo mankis por altar-ofero!

Tradukis T. Nakamura



## El Notlibro Esperantista

*Torus Mikami*



Kiam mi vizitis s-ron T. Nakamura lastan fojon, ni longe interparolis pri la tradukarto de klasikaj japanaj poemetoj. Mi demandis lin, kiu estas pli facila por esperantigo, ĉu hajko (5.7.5.silaba) aŭ tanko (5.7.5.7.7.silaba). Li respondis: "Se mi dirus, ke en ambaŭ okazoj

TRADUTTORI TRADITORI, mi estus tro sofista, kaj tial mi povas diri, ke kiom koncernas la klasikajon laŭforme, hajkoj estas pli facilaj." Kial? Li klarigis, ke hajkoj estas esprimitaj en la "parolata" lingvo, dum tankoj estas plenaj de beletristikaj vortoj kaj esprimoj kun elegantaj epitetoj, laŭlitere, la "kapkusenaj vortoj." Tiuj ĉi vortoj kredeble estis plensencaj en la antikva tempo, kiam ili estis uzataj por la unua fojo, sed ili jam fariĝis tiel stereotipaj ke, se uzataj, ili estas nur konvenciaj kaj ofte sensencaj. Hodiaŭ, la etimologio de kelkaj "kapkusenaj vortoj" estas preskaŭ forgesita tiel, ke eĉ inter specialistoj ekzistas malsamaj opinioj.

Nu, s-ro Nakamura montris al mi la jenon el la aprila n-ro de LITERATURA MONDO, 1933.

La vosto de fazano  
—Hitomaro—

Kiel etendita  
pava vosto — nokto flugas.  
tiel longe mi enuas  
sopirante, dormiĝante  
nokte sur sternaĵo lita.

GRABOWSKI

Kiel trenata  
vosto de la fazano —  
ĉu tiom longe  
daŭros soleca nokto —  
aĥ! en mia kabano.

HOHLOV

Ho longe, longe,  
kiel la vost' fazana,  
treniĝas nokto,  
dum oni kuŝas sola  
en dorm-atendo vana.

TOTSCHÉ

Ŝajnas sin treni  
kiel la plumo vosta  
de la fazano  
la longa longa nokto —  
aĥ kuŝi en solo frosta!  
KALOCSAY

Nokt' longa, longa  
kiel la vosto lula  
de la fazano,  
kiu treniĝe paŝas!  
ĉu dormu mi solula?  
WARINGHIEN

Due, li montris al mi 1-an n-ron de LA PIRATO, 1933, en kiu mi legis la jenon sub la titolo "Multe da bruoj pro... vosto de fazano!"

\*

"En la aprila numero de Literatura Mondo aperis kvin Esperantaj tradukoj de la fama "tanka" (?) de japana (aŭ ĉina) poeto Hitomara<sup>①</sup> "La Vosto de Fazano". La kvin tradukintoj nomiĝas Grabowski, Hohlov, Kalocsay, Totsche kaj Waringhien, el kiuj — se ni estas ĝuste informitaj — preskaŭ neniu estas japano. Kion ni dirus, se niaj japanaj amikoj, por sin venĝi, entreprenus nun la Esperantan tradukon de niaj eŭropaj verkistoj?? —

La kvin cititaj tradukoj estas kvin variantoj. Nur pri unu punkto ili ŝajne unuanime konsentas: "La nokto estas tiel longa, kiel la vosto de fazano." — Hi, hi! Ni tre dezirus vidi tiun fenomenan fazanon aŭ koni tiun malfeliĉan landon, kies noktoj ne estas pli longaj ol la vosto de fazano. Tiu lando verŝajne nur malofte estas la celo de geedziĝvojaĝoj.

Ĉe Grabowski la vosto fazana apartenas al... pavo. — Hohlov konkludas: "Aĥ, en mia kabano!" kaj Kalocsay: "Aĥ, kuŝi en solo frosta!" — Totsche senaŭse sed vane atendas la dormon, dum Waringhien time sin demandas: "Ĉu dormu mi solula?"

Aĥ, aĥ, aĥ, sinjoro Waringhien, ĉu oni iam scios, kiel vi solvis ĉi tiun problemon! LA DEJORANTA PIRATO"

\*

La "Pirata" vidpunkto estas satire interesa. Mi do demandis s-ron Nakamura, ĉu li havas sian tradukon. Li diris; "La kvin variantoj estas sufiĉe "fenomenaj"; pro kio mi bezonus fari la liston longa pli ol la pendanta vosto de la viro de l' arboza monto.birdo?" Kaj li improviziis jene en pli moderna formo:

Kiel senfina  
"nokt'fantom" Esperanta  
en "sonĝ," "obstina,"  
tiel longan nokton ĉi,  
ĉu endormu sola mi?

① Hitomaro. Se vi legus "mara" ĉiuj japanoj ridcs, ĉar ĝi estas la vira...

② En la japana lingvo, fazano nomiĝas "monto-birdo," kaj la epiteto por kroni la vorton "monto" estis laŭlitere "pied-tira" kaj laŭsence "arboza" (laŭ la klarigo de vortaristo).

## Kio estas Oomoto?



Por respondi ĉi tiun demandon, permesu nin unue fari demandon. Ĉu vi pensas, ke la homaro nun iras la vojon prosperan, aŭ danĝeran? Certe, vi ne hezitas respondi per montro al la dua. Tamen ĉu vi iam pripensis, pro kio la homaro devas sekvi tiel danĝeran vojon?

Laŭ nia Oomotana opinio, la mondon regis kaj regas ankoraŭ la malnova principo de korpo-super-animismo (體主靈從). Sub ĝia regado, politiko, ekonomio, kaj ĉiu ajn alia branĉo de administracio kaj eĉ scienco, pli kaj pli enkorpiĝas al si la spiriton de egoismo kaj perfortismo, ĝis la homaro per ili riskas eĉ sian tutan ekziston.

La principo, kiun Oomoto akcentas, estas tiu de animo-super-korpismo (靈主體從) laŭ kiu la homoj povas vivi kaj ilia mondadministracio povas funkcii en giganta organismo en plena harmonio kun Dia volo kaj Dia plano. La volon de Dio klarigas ĉiuj religioj. Sed la planon de Dio ne ĉiuj. Tion lastan Oomoto povas montri.

Oomoto estas la reforma movado komencita de Dio pere de Nao Deguĉi en 1892. Ĝi estas Alpha (長<sup>ア</sup>) kaj Omega (長<sup>オ</sup>) de la Mondo. Ĝi aperis por meti finan punkton al la malnova vivprincipo de korpo-super-animismo, kaj redoni al la homaro la ĝustan vivprincipon de animo-super-korpismo — por savi la mondon ĝustatempe. Per la termino “animo-super-korpismo” ni ne intencas ignori korpon; male, ni gravigas animon kaj korpon egalmezure (50-50), nur kondiĉe ke la unua ĉiam gvidu la lastan kaj neniam renverse.

La japanlingva formulo presita laŭ  
la postulo de leĝo.

OOMOTO, N-ro 130 (4月號)

定價30圓 送料6圓

一カ年購讀料360圓

昭和26年 3月25日 印刷

昭和26年 4月 1日 發行

編輯人 京都市外龜岡町天恩郷  
中村 三

發行人 京都市外龜岡町吳服町12  
土井 三郎

發行所 京都市外龜岡町天恩郷  
瑞光社 振替番號 京都 25757

印刷所 京都市東山區一ツ橋宮ノ内町  
愛善苑中外印刷所

La ekzistado de gazetoj kiel  
“Oomoto”... jam de nun  
permesas al ni vivadi en tiu  
glora estonto de la homaro,  
antaŭĝuante feliĉon tute ne  
kompreneblan por homoj de la  
malnova spirito. Ni esperantistoj  
idealistoj jam enkorpiĝas la  
novan mondon kaj sukcesas  
pasigi en ĝi la plej belajn mo-  
mentojn de nia surtera vivado.

ISMAEL GOMES BRAGA

(El “Veterano?”)

